EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 67>** ● Afriko ● IPR ● Eo-Libro ● Futbalo ● Hispana kurso **< dec 1**

# Renovigita pli juna afrika komisiono

Jen estas la nomoj de la nunaj membroj de la Afrika Komisiono de UEA:

1. S-ro Aimé Patrick MANIRAKIZA: Kunordiganto (Burundo): Rilatoj kun afrikaj landaj asocioj. Rilatoj kun publikaj instancoj kaj retpaĝo
2. S-ino Ranja Robertine Jeanne d'Arc ZAFINIFOTSY : Vic-kunordiganto (Madagaskaro): Junulara Agado, reklamado en sociaj retejoj kaj Sporto
3. S-ro Koffitche KOUFIONOU: sekretario (Togolando): Informado, retradio kaj kongresoj
4. Espoir NGOMA KASATI: Vic-Sekretario (DR Kongo): Protokolado, Afrika bulteno kaj retaj kursoj
5. S-ino Miora RAVELOHARISON: Komisionanino (Madagaskaro): Virina Agado kaj Kulturoj
6. S-ro John E. MAGESSA: Komisionano (Tanzanio): (sur la foto) UK, Instruado, revigligo de lokaj E-kluboj kaj Turismo,



Aimé- Patrick Manirakiza, Kunordiganto

# Enhavo de la pedagogia revuo IPR 2022/4


- Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) p.3
- Sukcesa „Tago de Lernado" (Marija BELOŠEVIĆ) p.4
- Kristin TYTGAT: Dulingvaj lernejoj en Bruselo p.6
- Nitta TAKAMICHI: Kiel lernantoj gajnas memfidon p.9
- Alessandra MADELLA: Pri la jutuba kanalo de ILEI p.13
- Intervjuo kun Jean-Pierre Cavelan (Alessandra MADELLA) p.18
- Ĉu Aĥilo aŭ la grekoj konkeris Trojon? (Renato CORSETTI) p.20
- Kunspirado (Mireille GROSJEAN) p.24
- Intervjuoj de Alessandra MADELLA al Spomenka Štimec, Anna Löwenstein, Elisabetta Vilisics Formaggio p.27
- El la landoj kaj sekcioj (IN, BI, IT, HR, MG) p.36
- Tibor Sekelj refoje inter esperantistoj (intervjuo de Radojica PETROVIĆ al Renato CORSETTI kaj Ahmad MAMDUHI) p.42
- Alvoko de la 56-a ILEI-Kongreso p.51
- Esperanto per rekta metodo (Stano MARČEK) p.52
- Informoj pri ILEI, redakciaj informoj p.53

Sur la titolpaĝo: supre: grafikaĵo de Alessandra Madella el la „Silka Vojo” en la jutuba kanalo de ILEI (vd. p. 13).

# ILEI kaj la Tago de la Esperanta Libro

Por celebri la Zamenhofan feston en decembro 15-a, kiu estas ankaŭ tradicie la Tago de la Esperanta Libro, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) proponas simbolan tutmondan legadon, donante la elekton inter du malsamaj, sed same gravaj kaj signifoplenaj verkoj.

La unua estas la sprita klasika poemaro ***La Stranga Butiko***, verkita originale en Esperanto de Raymond Schwartz kaj eldonita en Parizo “dum Decembro de l’ krizjaro 1931.” Ĝi certe amuze ridetigos nin dum tiu ĉi malfacila tempo kaj esperigos nin pri pli bela estonteco.

La dua estas la novelo ***Antimilitisto*** (1934), verkita originale en la ĉina de Lusin (Lu Xun), unu el la majstroj de moderna ĉina literaturo kaj fervora esperantisto. Li interalie tradukis al la ĉina la verkojn de la blinda poeto Eroŝenko. Tiu ĉi novelo, inspirita de la homama kaj pacema penso de la ĉina filozofo Mozio, certe multe pensigos nin. La verkojn kaj ties enkondukojn (el vikipedio por Schwartz kaj el ĉina samideano por Lusin) vi povos libere elŝuti el la retejo de ILEI (**www.ilei.info**).

Vi estas tre bonvenaj legi ambaŭ verkojn aŭ ankaŭ nur parton de unu el ili, laŭ via intereso kaj deziro. Sed bonvole estu spirite kun ni, dum tiu ĉi bela tago de komuna legado.

# Esperanto en la monda futbala turneo




Sub la slogano ‘Esperanto: futbalo estas – pasio – respekto – teamlaboro – honesteco – kolektiva respondeco’ aperis bildoj pri futbalo kun teksto en Esperanto.

La informon dissendis Laszlo Szilvassi

Fernando Maia Jr.
**UEA, |** Vicprezidanto

Subtenu la laboron de UEA per membriĝo:
https://uea.org/alighoj/alighilo

# Burunda mesaĝo de Mirejo

Ni bonvenigas Gilbert Ndihokubwayo, kiu estas la sekciestro de la burunda ILEI-sekcio kaj komitatano. Mi denove vidis lin hodiaŭ kadre de la VK de UEA kaj povis denove aprezi liajn saĝecon kaj lertecon en la uzo de nia lingvo. Post la 7-a Afrika Kongreso de EO en Burundo en 2019 mi restis en Buĵumbura kaj instruis al Gilbert kaj al Patrick Manirakiza la bezonatajn pripedagogiajn konojn por instrui Eon post

plenjara trejnado reta. Kaj tiuj du instruistoj ricevis diplomon de ILEI pri instrukapablo. Nur tiuj du en Afriko, nur tri aliaj en Eŭropo. Plie mi tre gratulas, ke Patrick fariĝis kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA.

Mireille Grosjean

# Emilio Cid pri monakiro movadcela

Li prelegis pri granda monsubvencio por disvastigi Esperanton. https://vk.retevent.com/

Emiljo Cid

# Post la fizika, jen la virtuala

Post la 3-a **Virtuala Kongreso** de UEA (24-27.11). Se vi aliĝis vi jam hieraŭ ricevis ligilon kaj espereble jam sekvas la ege riĉan programon (pli ol cent programeroj, paralela junulara kongreso RETOSO kun 50 programeroj)..

Aliĝis pli ol 1450 personoj el 97 landoj aŭ regnoj. Ne maltrafu la plej grandan virtualan E-kunvenon, pli grandan eĉ ol pluraj Universalaj Kongresoj!

Amri Wandel, UEA

# Memore al muzikistoj

Ĉi-semajne du pliaj artistoj forlasis la Teron, kaj pro tio certe estiĝis grava manko en la muzika medio. Unu el ili, **Erasmo Carlos**, estis la ĉefa kunverkinto kun **Roberto Carlos**. Verkita de ambaŭ, estas publikigita en **Brazila Kolekto** dua traduko de la kanto *Vidu* (kiun ankaŭ registris Gal Costa!).

Memorinda estas **Pablo Milanés**, latinamerikano (verkinto interalie de la kanto *Jolanda*, de kiu estas du tradukoj publikigitaj en **Brazila Kolekto**), aperis la esperantigita *Kanto por la latinamerika unuiĝo*, kiun **Chico Buarque** adaptis kaj **Milton Nascimento** registris en la fama albumo *Clube da Esquina 2*.

## Italaj kursoj

Ĝis nun ni ricevis 83 kontaktojn, el kiuj 51 enskribiĝis al la kurso. Kelkaj el la kontaktintoj estis iamaj lernintoj, kiuj petis informojn pri duagrada kurso. Ili estis trandonitaj al Laura Brazzabeni, kiu aranĝas tian kurson. La kursoj komenciĝis la 14-an de novembro.
Ni havis 6 instruontojn por 8 kursoj [por havi malgrandajn lerno-grupojn]. La varba teksto estas ankoraŭ nesolvita problemo. La organizanto [G. Pfleger] pagis 50 eŭrojn por reta reklamado kaj ĝi estis afiŝita en proksimume 11 500 paĝojn. Pasintjare estis 100 kontaktoj per 170 eŭroj kaj 63 kursanoj, el kiuj nur 45 serioze partoprenis. La sistemo funkcias, sed oni povas mastrumi ĝin tre pli bone

Gianantonio Pfleger"

## Ekzamenoj en Moskvo

La 26-an de novembro, okazis la 11a KER-sesio en Moskvo, dum kiu estis ekzamenitaj dek personoj. Legu prian artikolon de Irina Gonĉarova en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” https://sezonoj.ru/2022/11/ruslando-36/

## Ondoj el la kongreso

En la septembra eldono de La Ondo de Esperanto (2022, №313) estis publikigita intervjuo kun la sekretario de LKK de la Montreala UK, Ĵenja Amis. Hodiaŭ ĉi tiu intervjuo, titolita “Mi estas feliĉa, kontenta kaj fiera”, aperis ankaŭ en la reto; legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2022/10/montrealo-34/

## La 3a hispanlingva kurso

Mi aktualigas vin pri la progreso de la 3-a kurso por hispanparolantoj, amerika agado de UEA partnere kun TEJO kaj Kolombia Esperanto-Ligo.La varba fazo finiĝis. Ni akiris de tio 431 aliĝintojn.

La kunordigantoj havas ĉi-jare la subtenon de 9 instruistoj:

- Araceli, - Carlos Lopez (Nova), - Carlos Velasquillo, - Daniel Cotarelo, - Luis Obando, - Moisés Herrera, - Luis Eliver (Nova), - Yair (Nova), - Doniben

Ni ne uzis pagatajn reklamilojn por allogi homojn, ni uzas nur *Facebook*-afiŝaĵojn, KEL-retejon kaj "voĉ-al-voĉon". 342 aliĝis al baza kurso kaj 89 al meznivela kurso.

La landoj estas: Argentino, Bolivio, Brazilo, Bulgario, Kanado, Ĉilio, Kolombio, Kostariko, Ekvadoro, Salvadoro, Hispanio, Usono, Francio, Gvatemalo, Honduro, Meksiko, Peruo, Kongo, Dominika Respubliko, Urugvajo, Venezuelo.

Ĉi-jare alia novaĵo estas, ke ni uzas la socian reton Discord por arigi la grupon. Ni esperas per tio ankaŭ kreskigi la uzon de Discord en UEA. Sed ĉar Discord ne funkcias bone por pli grandaj grupoj, ni ankaŭ uzos Google Meet por la lecionoj.

Maniero subteni la kurson estas donaco al Amerika Fondaĵo de UEA https://uea.org/alighoj/donacoj/ameriko - bona celo estus akiri 4000 EUR, ĉar tio helpas pri ĉiuj kostoj, inkluzive de aliĝo de kursanoj. Sed mi ne estas tre espera pri tiu atingo, tamen.

========= vortoj: 1200 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

RM ene nov 30 ED dec 1